MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7+8

JULIO-AŬGUSTO 2018 Kol. 399+400/34

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Esperanto-tago, Paraple, Helpu-helpi, Unua vojaĝo, IFEF- kongreso, Urseto, Invitoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

la venonta kongreso de Ĉeĥa E-Asocio, kiu okazos en la urbo Benešov, Petro Chrdle, la posedanto de la E-eldonejo KAVA-PECH ofertis novan Esperanto-literaturon.
Unu partoprenanto de la pasintjara UEA kongreso en Seulo prezentis siajn travivaĵojn el tiu ĉi malproksima lando. Ankaŭ la prezidantino de AEH, kiu gvidos karavanon de ĉeĥaj partoprenantoj al la alvenanta UEA-kongreso en la portugala ĉefurbo Lisbono, komunikis gravajn informojn bezonatajn por la aviadila forflugo.

Ĉiuj informoj aŭskuteblis en Esperanto, nur la historion de Kunětická hora ni aŭskultis de la estro de la burgo, en la ĉeĥa lingvo. La informpunktojn ornamis deklamo de E-poeziaĵo kaj kantado de ĉeĥaj kaj Esperantaj kantoj.
Post komuna tagmanĝo plimulto de la partoprenantoj vizitis la „Mielkukan dometon“(privatan muzeon), kie ni konatiĝis kun la historio de la fama „pardubica mielkuko“ en maniero sprite amuza; „la sorĉistino“ surloke preparis la figuretojn uzante por tio historiajn formujojn. Jarmila Rýznarová

Esperantistoj denove kuris por “Paraple”

Membroj de la grupo „E-mental“ partoprenis la karitatan aranĝon “Kuro por Paraple”, (ĉeĥe: Běh pro Paraple), kiu okazis dimanĉe la 10-an de junio 2018 en Prago. Paraple estas karitata organizo, kiu helpas al homoj kun paraplegio (damaĝita spina medolo).

Ĝi klopodas plibonigi kaj plifaciligi ilian psikan kaj korpan staton, helpas por atingi ilian plej eblan memstarecon kaj ĝi ankaŭ informas la publikon pri ilia vivo. Samtempe la „E-mentalanoj“ faris grandan reklamon por Esperanto. La kuro okazis ĉijare jam la 19-an fojon kaj pragaj esperantistoj partoprenis jam la duan fojon. La ĉefa organizanto estis la fama praga artisto Zdeněk Svěrák, honora membro de la grupo E-mental. Por la kuro estis kelkaj ebloj: a) kuri simbolan 100-metran kuron kun granda E-flago, tion partoprenis plimulto da nia grupo; b) partopreni 5 kilometran kuron — ĝin partoprenis nia membro la hungaro Tomasz kaj la celon li atingis kun la flago en la mano, en la unua deko da partoprenantoj; c) la ceteraj voĉsubtenis la kurantojn kaj fotis kaj antaŭ kaj post la kuroj ili ĝuis kulturan programon, piknikis, babilis...

Estis bele helpi, sed ankaŭ la kune travivita posttagmezo ĝojigis ĉiujn partoprenantojn.

Venontjare ni certe partoprenos denove! Ĉu vi iros kun ni?

Vlasta el la grupo E-mental.

Sukcesa HELPU HELPI 2018

La 27-an de majo 2018 okazis jam la kvina aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental´ aĉetis brikojn por la karitata projekto „Briko“, kiu helpas konstrui labor-trejnad-centron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.

Ni kolektis monon por 37 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj. Ili admiras la muron kaj fotas ĝin.

Kun la muro ili nun fotas ankaŭ niajn Esperanto-brikojn, kaj do oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenintoj, kiuj helpis surloke kaj apartan

dankon al la eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon. Ĉiu, kiu volas tiel subteni la handikapulojn, aĉetas brikon por 150,-Kč; ĝi estas el la ŝamota materialo, ĉiu povos ĝin ornami – pridesegni per farboj, kiuj estas al la dispono – aŭ se li aŭ ŝi ne havas intencon ion surpentri sur la brikon, li lasas ĝin pura. Vlasta

Mia unua vojaĝo okcidenten

(Kial mi nun rememoras la vojaĝon antaŭ 54 jaroj? Mi ricevis mortoanoncon de nia konata familio el Rotterdam, kiu estis preskaŭ kvazaŭ niaj parencoj. Multfoje ili kun ni traveturis nian landon (17foje) kaj tiel ankaŭ multaj ĉeĥaj esperantistoj konas ilin. /†B.Demmendaal 92j./ Kaj tiel miaj pensoj rememoris la tempon de nia interkonatiĝo).

Ĉe UEA-kongresoj de esperantistoj, kiujn oni aranĝas ĉiujare en alia lando, okazadis ankaŭ Belartaj Konkursoj. Antaŭ jaroj ekzistis inter poezio, prozo, teatraĵo aŭ kantoj kaj ankaŭ fotografado. Tiun ĉi branĉon ankaŭ mi partoprenis en la jaro 1964. Temo de la fotokonkurso estis frazo el la libro Taglibro de Anne Frank: „ĉu mi tiel freneze amas la naturon, ke pro tio mi tiel longe ne povas elpuŝi mian nazon eksteren?“
Por la konkurso mi sendis foton – sunsubiron inter nuboj post la pikdratoj.
Mi gajnis unu el la ĉefaj premioj, 150 guldenojn. Kiam mi demandis en nia ŝtata banko, kiom da ĉeĥoslovakaj kronoj mi povas ricevi por tiu sumo, ili diris al mi, ke 300,- Kčs. Tia respondo min kompreneble ne kontentigis. Helpe de konataj

esperantistoj mi interligis min kun nederlanda familio el Rotterdam, kaj ili skribis al mi: „Vi povas alveturi al ni kun Via edzo por 10 tagoj; 50 guldenojn ni prenos por Via restado inkluzive manĝon kaj por 100 gld Vi traveturos kun ni trionon de Nederlando.“ Hoj, ni estis feliĉaj. Poste ni kune tre ofte korespondis kaj pluan jaron ni preparis nin por la vojaĝo.
Ni ambaŭ ricevis nur po 5 dolaroj por 10 tagoj (!) kaj niaj novaj geamikoj devis skribi deklaron, ke ili ĉion por ni pagos.

Kelkajn tagojn antaŭ nia forflugo venis en mian oficejon nekonata viro, montris ian identigilon kaj konsilis al mi, ke ni evitu emigrantojn kaj se dum nia vojaĝo aŭ en Nederlando iu demandus pri nia armeo, aerodromo, kazerno aŭ soldatejo, ke mi ne respondu. Mi konsentis, ĉar mi entute pri io simila eĉ ne pensis.

Mi ne volas ĉi tie skribi pri nia belega vojaĝo, pri plenplenaj nederlandaj vendejoj, kiuj en tiu tempo ĉe ni estis malplenaj, ja por ĉio ni devis stari en vicoj.
Laŭ la kutimo de mia junaĝo mi notis ĉiujn travivaĵojn en mian tagkajereton kaj kiam mi revenis en mian oficejon, mia kajereto estis en mia mansaketo, ke mi povu dum tagmeza paŭzo rakonti al miaj kunlaborantoj pri mia belega vojaĝo.

Sed tuj matene aperis en mia oficejo fremda viro, montris identigilon de STB (sekreta polico) kaj diris, ke li ricevis permeson de mia direktoro kunforveturigi min. Do mi kunprenis mian mansaketon kaj kun granda timo mi foriris kun li. Antaŭ la entrepreno li sidigis min en lian aŭtomobilon kaj ni haltis antaŭ „ministerio de timego“, kiel ni diradis pri polica direktorejo. La lifto veturigis nin al la supera kvina etaĝo, kun krado antaŭ ĝia

pordo. Post la sonorigo malfermis al ni pordisto kaj la viro gvidis min ĝis fino de longa koridoro. Li malŝlosis la ejon, ni eniris, li ŝlosis kaj la ŝlosilon metis en sian poŝon.

Ĉu vi povas imagi – ĉefe vi, virinoj – mian grandegan timon, kiam antaŭ la fenestro staris divano kaj mi en tiu tempo estis ankoraŭ juna kaj sufiĉe belaspekta? Ja en tiu tempo mi aŭdis, kiel policistoj batis homon, kiu ne volis diri la veron pri politikaj aferoj kaj ankaŭ mia patro estis la tutan tagon esplordemandita kaj batita pro tio, ke li ne skribis en ofican demandilon, ke lia bofrato fuĝis en okcidentan landon. Mia patro revenis kun du rompitaj dentoj.

Tiu ĉi viro komencis demandi min, kiel mi fartis en NL, sed mia gorĝo estis kunpremita tiel, ke mi ne povis normale paroli. Hazarde mi rememoris pri mia tagkajereto, mi pruntis ĝin al li kaj mi petis, ĉu mi unue povus manĝi mian bulkon, ke mi hejme ne havis tempon por matenmanĝi. Ke li dume legu kaj mi poste respondos, kion li bezonos scii.

Do mi iomete trankviliĝis kaj poste respondis. Li kelkfoje min certigis, ke li ĉion scias, sed ĉion li volas aŭdi de mi. Mi respondis tre naive, ekzemple, ke mi tute ne komprenas, kial oni skribas pri loĝantoj post la ferkurteno, ke ni en Ĉeĥoslovakio ne havas sufiĉe da manĝo, eĉ ne belan vestaĵon kaj ili poste vidis nin bone vestitajn, ke tio estas stranga politiko, kiu malbonigas nian nacion.
Kiam la sekret-policano nenion gravan de mi eksciis, li proponis al mi pli bonan okupon, pli taŭgan labortempon kaj duoble pli grandan salajron. Kiam mi demandis pri la speco de la menciita laboro, malfacile mi restis trankvila. Ke sekrete mi malfermus

leterojn de esperantistoj kaj legus al li, ĉu tie ne estas io malbona, skribita kontraŭ nia respubliko. Kiam mi rifuzis, ke mi tre malfacile kutimiĝas al nova etoso kaj nova kolektivo, li demandis, ĉu miaj kunlaborantoj ofte rakontas iajn politikajn anekdotojn.
Tiu homo vizitis min en la okupo ankoraŭ dufoje, sed li ne sukcesis min persvadi al kunlaboro.

Jarmila Rýznarová

La 70-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso 19. - 25. de majo 2018

Fervojistoj festis sian jubilean 70-an kongreson de Esperanto en Pollando, en la bela urbo Vroclavo. La pola fervojista asocio kunlabore kun la membroj de la Silezia asocio kaj aliaj esperantistoj sub la gvido de Teresa Pomorska pretigis riĉan programon. La aranĝon partoprenis 124 gesamideanoj el 19 landoj. La plej foraj venis el Ĉinio kaj Usono. Ĉe la enirhalo de la vroclava ĉefa stacidomo *Wrocław Głowny* estis instalita alloga ekspozicio pri d-ro L. L. Zamenhof kaj pri la lingvo Esperanto. La kongresejo troviĝis en la hotelo *Piast* situanta vid-al-vide al la stacidomo. Sabate dum la interkona vespero okazis prelego pri la regiono. Ravis nin la nokta surakva lumspektaklo kaj piroteknikaĵoj ĉe Multmedia fontano.

La solena inaŭguro okazis en la impona eksa kapelo *Oratorium Marianum* de la Vroclava Universitato kun ĉeesto de ĝia rektoro

s-ro Adam Jezierski. Li plezurigis nin per ludado de orgeno malnova je 300 jaroj. Post pluraj bonvenigaj salutvortoj de la prezidantino Rodica Todor kaj aliaj reprezentantoj sekvis la legado de bondeziraj mesaĝoj, salutoj de ĉeestantoj de la partoprenantaj landoj kaj disdono de honoraj diplomoj. Post la malfermo de la kongreso okazis komuna fotado ekstere sur la placo ĉe fontano. Posttagmeze ni vizitis la urbon. Tre varia estis la Nacia vespero, en kiu prezentiĝis tri folkloraj grupoj. Ili regalis nin per kantoj kaj dancoj el diversaj polaj regionoj.

Dum la semajno kunvenis la estraro de IFEF. Krom pridiskuto de movadaj aferoj okazis fakaj kaj aliaj prelegoj. Komencantoj havis eblon sekvi E-kurson kaj komencintoj povis progresi en la parolado. Atelieron pri "Kiel efike kunlabori kun redakcioj kaj ĵurnalistoj" gvidis la sperta ĵurnalisto Alfred Schubert. Dum lia alia sesio, partoprenantoj akiris bazajn informojn pri verkado de retpaĝoj. Hispanaj samideanoj prezentis al ni la venontan kongreson, kiu okazos en Malago. Alloga estis anonco pri la tritaga postkongreso en Maroko. Surloke jam eblis aliĝi.

Admirinda estis vizito de botanika ĝardeno kun ĉiĉeronino, kiu donis al ni sciigojn pri diversaj plantoj, floroj kaj arboj. Speciala fenomeno, kiu vekas intereson de turistoj estas kelkcentimetrojn altaj bronzaj koboldoj en diversaj pozicioj. Ili invadas la tutan urbon. En Vroclavo tiutempe okazis muzikkantfestivalo de Esperanto, kiun ni povis ĉeesti. En ĝi prezentiĝis la blindaj

esperantistoj Kaŝi (Carsten Schnathorst el Germanio) kaj Wojciech Ławnikowicz. La ĵurion reprezentis la konata kaj ŝatata muzikisto JoMo, kiu poste ĉe la fermo de la kongreso kantis por ĉies ĝojo. Ankaŭ koncerto de Kaŝi en salono de la Vroclava centra stacidomo havis grandan sukceson.

Ĉiuj ĝuis la ŝippromenon sur la rivero Odro kun vespermanĝo kaj koncerto de la ĉeĥa ensemblo "NOPROBLEM". Sekvis vespera promeno tra la malnova kvartalo *Ostrów Tumski*. La nokto estis agrable varma kaj ĉie svarmis ridetantaj homoj.

Ne mankis vizito per trajno al fervoja muzeo en *Jaworzyna Śląska*, kie ni admiris vagonaron kaj antikvajn vapor-lokomotivojn ekde la jaro 1890 ĝis la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento. Veturante en vagono ni spertis turnon sur turn-platformo. Sekvis vojaĝo al la urbeto Św*idnica* kaj vizito de du preĝejoj, el kiuj la kirko de la Paco estas unu el la plej grandaj kaj interesaj lignaj preĝejoj en Eŭropo.

Alia interesa ekskurso gvidis nin al la Valo de palacoj kaj ĝardenoj. Unue ni trarigardis parkon de miniaturoj en *Kowary* kaj poste ni admiris kelkajn palacojn de la regiono. Dum la ĝisrevida vespero vroclavanoj de la Tria Aĝo ĉe la Ekonomia Universitato prezentis muzikan spektaklon kaj kelkajn hajkojn. Teresa kunvenigis ĉiujn helpantojn kaj ni aplaŭdis ilin

pro la sukcese aranĝita kongreso. Mallonge gitarludis Wojciech Ławnikowicz kaj JoMo. Al hispanaj gesamideanoj estis transdonita la flago kaj la kongreso estis fermita. Sekvis tritaga postkongreso en la urbo Krakovo. La programo inkluzivis viziton al la fama salminejo *Wieliczka*, kunvenon kun lokaj esperantistoj kun riĉa bankedo, ekskurson al la kastelo *Wawel* kaj promenon en la juda kvartalo *Kazimierz*. Liba Gabalda

La urseto

Stefano estas plenkreska Urso bruna. Ĝi vivas jam 23 jarojn en rusa familio, ĉe la geedzoj Pantĕlejenkaj. Ĝi venis al ili kiel eta urseto, kiam ĝia patrino pereis. De tiu tempo la urseto estas malsovaĝa kaj tre trankvila.

La urso estas fakte membro de la familio, kie ĝi ĉiutage vivas. Ĝia ŝatata trinkaĵo estas kondensita lakto. Krom tio ĝi manĝas ĉiun tagon proksimume 25 kilogramojn da fiŝoj kaj legomon kun ovoj.

Sed plej multe ĝi ŝatas la karesadon sur la sofo kun siaj gepatroj kaj amas piknikojn. El interreto tradukis jary

Invitoj:

85-a Itala kongreso de Esperanto en itala San Marino okazos 18. – 25. 8. 2018. Kongresa temo: San Marino kaj Esperanto: Malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj. Kontakto:

FEI (Federazione Esperantista Italiana) Via Villoresi 38
120143 Milano, Italio. Retpoŝto: kongreso@esperanto.it

S k o k o v y

48-a lingva seminario en la vilaĝo Skokovy okazos de 19. 9. 2018; kontakto: drahotovaesperanto@seznam.cz

Allogo por venonta jaro:

Esperanto-Semajno 2. - 9. 3. 2019

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :**Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio prezmoni@hotmail.com **–** tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.